




Boletín

n° 415 Julio - Septiembre 2016



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 415

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrún

Kasisto. Rosa López

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo (prezidanto
de Hejs)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

Salutvortoj

Karaj gelegantoj, kun granda ĝojo mi prezentas al vi la trian bultenon de la jaro kun variaj artikoloj el nombraj kunlaborantoj kiel: Antonio Marco Botella, Antonio Valén, Miguel Fernández, José Antonio del Barrio, Alejandro Escobedo, Jorge Camacho, Mark Fettes, Alberto Granados, Lorenzo Noguero, ktp. Mi tre ĝojas pro tio, ĉar la enhavo estas varia kaj vere interesa. Amantoj de la poezio povas ĝui belajn pecojn bone verkitajn. Homoj, kiuj interesiĝas pri kongresoj, ja povas imagi kiom interesa estos la hispana kongreso en la bela urbo Teruelo kaj la okazintaj en Italio aŭ la UK en Nitro. Gejunuloj ankaŭ havas interesan tekston verkitan de Aleks Escobedo. Amantoj de muziko trovas artikolon pri la hispana grupo *Cronómetrobudú*, kiu nomis sian baldaŭ registrotan K-diskon Esperanto, do, kion pli ni povas peti? Legu la tuton, ĉar estas pliaj artikoloj pri malsimilaj temoj, kiujn vi devas malkovri. Pro tio mi petegas al ĉiuj daŭre kunlabori, ĉar nia bulteno estas ilo por informi pri Esperanto kaj pri aferoj rilataj al nia universala lingvo. Ĉi foje la afero bonegas, sed mi scias ke ĝi povas pliboniĝi se vi ne forgesas sendi al la Redakcio viajn impresojn, anekdotojn, spertojn, ktp, rilate al Esperanto.

Ni atendas vian pozitivan reagon.

La Redakcio

Enhavo

Salutvortoj	1
Unuaj kunvenoj de la estraro de Hispana Esperanto-Federacio	3
Universala Esperanto Asocio organizas Ĝeneralan Voĉdonadon...	5
Projekto Don Quijote	7
Kolokvo dum la Eŭropa Tago de Lingvoj	8
Premioj dum la Universala Kongreso	9
76-a Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo	10
Anonco kaj novaĵoj el agadoj de nia junulara sekcio	12
Pri Grupoj kaj Asocioj	14
Nekrologe	16
Komunikado de HEF kaj sociaj retoj	17
Poezia Angulo	18
Kronikoj pri la tajfoj de Badajoz	19
Letero al la Redakcio kaj nefermita respondo	22
Mi ĉeestis la 101an Universalan Kongreson en Slovakio	23
La 83a itala kongreso de Esperanto en Frascati	25
Miaj impresoj pri la 83a itala kongreso en la urbo Frascati	27
Fama hispana rok-ensemblo priomaĝas Esperanton	29

KUNLABORU KUN NIA MOVADO. APOGU FUNDACIÓN ESPERANTO.

Viaj kontribuoj estas bonvenaj ĉe la konto ES15 2100 5553 3621 0040 6825 de la Caja de Ahorros y Pensiones "La Caixa".



**FUNDACIÓN
ESPERANTO**

UNUJ KUNVENOJ DE LA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Komence de septembro, post la ferioj, okazis la unua formala kunveno de la nova estraro de Hispana Esperanto-Federacio, kiun partoprenis ĉiuj estraranoj, ĉu ĉeeste en la sidejo aŭ pere de Skajpa konekto.

Ni unue pritraktis la diversajn kutimajn kaj burokratajn taskojn kiujn oni devas plenumi en tiu ĉi nova periodo, interalie pretigadon de la dokumentoj de la asocio en la novaj komputiloj kaj en reto, reguligon de la subskriboj en la bankoj laŭ la nova estraro, dividon de la taskoj inter la estraranoj, ktp.

Ni pretigas nun novan datumbazon, kiu ebligas pli koheran kontrolon de la datumoj de la anoj. Tiurilate, la estraro decidis ke dum venontaj semajnoj ni sendos leteron al ĉiuj anoj, por konfirmi ke la datumoj je kiuj ni disponas estas ĝustaj, kaj ankaŭ por konfirmi ke la anoj ŝuldantaj plurajn kotizojn al la asocio deziras ankoraŭ resti membroj, kaj do instigi pagi la kotizojn novajn kaj ŝuldatajn.

La estraro parolis ankaŭ pri la rilatoj kun UEA kaj TEJO. Konkrete, ni diskutis pri la rajto de HEF voĉdoni pri la ŝanĝoj de la statutoj de UEA, interalie pro tio, ke TEJO volas sian sendependecon. Pri tio vidu apartan artikolon.

Ni diskutis kongresajn aferojn. Unue, ni unuanime taksis tre sukcesa la pasintan Kongreson de Herrera del Duque, kies bilanco rezultis pozitiva, laŭ programo kaj ankaŭ ekonomie. Oni parolis pri la sidejo de la Kongreso 2017 (pri tio legu poste).

Krome, HEF decidis proponi al UEA sian pretecon helpi pri la bona sukceso de la Universala Kongreso de 2018, kiu, laŭ decido konigita en Nitro, okazos en la ĉefurbo de nia najbarlando, en Lisbono. Estis diskutita la eblo organizi la Internacian Junularan Kongreson ie en la hispana teritorio. Ankaŭ ILEI petis helpon al HEF por aranĝi sian Kongreson 2018 en Hispanio. Oni decidis proponi nian helpon al asocioj por la internaciaj kongresoj en 2018.

Ni parolis pri la Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo kaj la Andaluzo Kongreso, kaj la ebla helpo de HEF al ambaŭ eventoj, kaze ke tio necesos, kaj pri iu Festivalo por “Seniors” (emerituloj kaj pliaĝuloj), organizota en Almerio fare de asocio por emerituloj, kies organizantoj petis al HEF helpon pri la disvastigo de kurso eble organizota ene de ĝi.

Pri la Projekto Donkiĥoto, oni informas ke la Ŝtata Komisiono aprobis nian agadon kiel unu el la eroj de la oficiala programo de kummemorado de la datreveno de Cervantes. Ni faros demarŝojn ĉe oficialaj organizaĵoj (ekz. Biblioteca Nacional kaj Instituto Cervantes) por organizi publikan prezentadon de nia eldono al la ĝenerala publiko.

Pri la Zamenhof-jaro 2017, ni decidis ke HEF pretigos planon por la kunmemoro. La prezidanto kontaktis kun la Pola Instituto pri Kulturo, en Madrido, por kunlabori pri la afero. Ni faros alvokon al la diversaj grupoj, ke oni kunmemoru tiun datrevenon en la tuta lando, kaj profiti la okazon por disvastigi la figuron de Zamenhof kaj ties lingvo.

La estraro diskutis aliajn agadojn kaj planojn, pretigitajn dum la venontaj monatoj, pri kiuj ni iom post iom decidis.

Ni decidis fari penon por kunordigi la informadon pri novaj kursoj, demandante al la grupoj kaj individuaj aktivuloj pri la komenco de la novaj kursoj por aktualigi la retpaĝon de HEF rilate al tiu afero.

Ni ankaŭ planas pretigi en la retpaĝo de HEF novan sekcion pri helpo post retaj kursoj kiel *Duolingo* kaj *Lernu!*. Ni ankaŭ organizos aliajn manierojn helpi la retlernantojn hispanlingvajn, por havigi lernmaterialon, kontaktojn, renkontojn, ktp

Rilate al junulara agado, oni informas ke la retejo *esperanto.net* estas renovigata kaj HEJS estas kunlaboranta speciale por junuloj. Ankaŭ la junulara sekcio de nia retejo *esperanto.es* espereble estos baldaŭ renovigata. Pri ĉio ĉi vidu apartan artikolon en tiu ĉi Boletín.

La estraro de HEF denove kunvenis la 11-an de oktobro, ĉefe por aprobi la datojn kaj sidejon de la nacia kongreso en 2017. Ĝi estis malfërma kaj anoncita en nia retlisto kaj sociaj retoj, kaj do krom la estraranoj ĉeestis ankaŭ la komisiito pri kongresoj, Javier Romero Tello, kaj la respondeculoj de la grupoj de Teruelo kaj Madrido, respektive Alberto Granados kaj Manolo Parra.

La ĉefa celo de tiu ĉi kunveno estis la decido pri la loko kaj dato de la 76 Hispana Kongreso de Esperanto. Alberto, nome de la grupo “Liberanimo” de Teruelo, proponis tiun ĉi urbon, kiel sidejon de la Kongreso, kaj esprimis la avantaĝojn de la urbo kaj la kontaktojn jam faritajn. Ni diskutis la eblajn datojn, kaj konkludis ke la plej konvena estos la semajnfino de la 23-a ĝis la 25-a de junio 2017. Por homoj kun ebleco kaj emo resti plu, oni probable povos organizi agadojn antaŭ- aŭ post-kongresajn, interalie konekse kun seminario por junulara trejnado, kiujn oni konfirmos poste. Oni kalkulas je la kunlaboro de lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj, kaj ankaŭ de la universitata sekcio, kie preskaŭ certe troviĝos la ĉefsidejo de la kongreso. Ni diskutas la unuajn ideojn pri programo, infrastrukturo, loĝejoj, ktp, kiujn oni konkretigos dum venontaj semajnoj.

La estraro de HEF aprobis la lokon kaj datojn proponitajn, kaj montris la pretecon kunlabori en la organizado, kune kun nia nova kaj entuziasma grupo “Liberanimo”. Ni jam de nun faras alvokon al la anoj, rezervi la datojn, aliĝi baldaŭ, kaj preti ĝui nian venontjaron renkontiĝon.

La estraro

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ORGANIZAS ĜENERALAN VOĈDONADON PRI STATUT-ŜANĜO

Dum la Universala Kongreso en Nitro dum pasinta julio, kunvenis la Komitato de UEA, la supera organo de la Asocio, kaj aprobis proponon de nova Statuto, kun diversaj ŝanĝoj en pluraj artikoloj. Tiujn ŝanĝojn nun devas aprobi (aŭ malaprobi) la membraro.

Tiuj el la legantoj kiuj estas samtempe Individuaj Membroj de UEA jam ricevis la balotilon, kaj havas rajton voĉdoni jese aŭ nee al ĉiu el la proponataj modifoj. Ankaŭ Hispana Esperanto-Federacio, kiel landa asocio de UEA, rajtas je voĉdono, kun tiom da voĉoj kiom da aligitaj membroj ni deklaris al UEA.

Antaŭ ol decidi nian voĉdonon, la estraro de HEF decidis malfermi debaton inter niaj anoj. Ni petas vian opinion pri la proponitaj ŝanĝoj. Pri tio, vi povas legi en la apuda letero de Mark Fettes, kiu baze prezentas la ĉefajn punktojn. La homoj kun aliro al la reto povas konsulti la detalojn, kun la konkretaj artikoloj, en la retejo de UEA <http://www.uea.org/teko/komitato>, kie ankaŭ troviĝas pluraj aliaj dokumentoj kiujn la Komitato produktis por diskuti la aferon. Homoj kun malfacila aliro al la reto, aŭ kiuj deziras aparte demandi pri la detaloj, povas skribi al HEF, ĉu al la fizika adreso, ĉu al la retadreso hef@esperanto.es.

La ĉefa punkto kiu levis pli da diskuto estis la konfirmo en la Statuto de UEA pri la jura sendependiĝo de ties junulara sekcio, TEJO. Pri tiu debato, oni povas legi en la reto, en la retlisto de la Komitato de UEA, kiu estas malferma, aŭ en diversaj aliaj medioj. Ni volonte sendos al tiuj interesatoj la necesajn informojn, kaj pri tiu aspekto ni speciale deziras legi vian opinion.

La ceteraj punktoj, ekz. rilataj al reta voĉdonado, al relativaj plimulto kaj al organizaj detaloj, estas konsiderataj malpli problemvekaj, sed denove ni volonte ricevos vian opinion pri ili.

Ne hezitu opinii, demandi kaj proponi. La estraro de HEF volonte aŭskultos la opiniojn de ĉiuj ties anoj, kaj decidos laŭ la plej demokratia maniero en kiu tio eblos.

La Estraro

LETERO DE MARK FETTES, PREZIDANTO DE UEA

Al ĉiuj aliĝintaj Landaj Asocioj de UEA

Karaj kolegoj,

[Kun la letero] vi trovos voĉdonilon, kaj kun ĝi broŝuron pri diversaj ŝanĝoj proponitaj por la Statuto de UEA. Ni malofte faras tiajn ŝanĝojn – la lasta Ĝenerala Voĉdono pri la Statuto okazis en 1979! Tial mi volas mallonge klarigi la rolon de la Landaj Asocioj

en tio, kaj skribi kelkajn vortojn pri la celoj de la nuna propono, kiu venas al vi esence kiel rekomendo de la Komitato de UEA, nia supera gvidorgano.

En Ĝenerala Voĉdono, la voĉoj de niaj aligitaj membroj esprimiĝas pere de la Landaj Asocioj. [...] Landa Asocio voĉdonu bloke pri la unuopaj artikoloj (t.e. ne eblas dividi la voĉojn: sur ĉiu linio de la voĉdonilo oni faru nur unu elekton, kiu do ricevas ĉiujn voĉojn de la asocio pri tiu punkto).

Eble la plej grava ŝanĝo proponita en ĉi tiu Voĉdono estas la jura memstariĝo de TEJO, nia junulara sekcio. Tio respondas al la efektiva evoluo en la lastaj jaroj. Laŭ la proponitaj ŝanĝoj, UEA kaj TEJO estonte interrilatos kiel du memstaraj asocioj jure registritaj en Nederlando, kun komuna membro-administrado kaj proksima kunlaboro. Nova regularo, kiu difinas tiujn rilatojn, estas jam akceptita de la Komitato; la Statuta ŝanĝo kompletigos tiun evoluon.

Aliaj ŝanĝoj celas faciligi kaj pliklarigi la mastrumadon de UEA. Tio inkluzivas uzadon de Interreto (kaj aliaj telekomunikiloj), kaj plurajn ŝanĝojn rekomenditajn de nederlanda notario por konformi kun la nederlanda juro.

Fine, ni proponas ankaŭ iom mildigi la postulojn por estonte ŝanĝi la Statuton. Laŭ la nuna Statuto, necesas ke ĉiun ŝanĝon subtenu pli ol duono de ĉiuj eblaj voĉoj. Ni proponas ekde nun rezervi tiun postulon por la eventuala malfondo de la Asocio. Por statutŝanĝo, sufiĉos – laŭ nia propono – du trionoj de la donitaj voĉoj; do, granda, sed relativa, plimulto. Tiel homoj, kiuj ne voĉdonas, ne povos malhelpi ŝanĝojn kiuj havas grandan subtenon [...]

Post la fino de tiu ĉi Ĝenerala Voĉdono, ni intencas malfermi vastan diskuton pri kelkaj aliaj proponitaj ŝanĝoj en nia Statuto, inkluzive de novaj vortumoj de la celoj kaj principoj de UEA. Mi esperas ke via asocio aktive partoprenos en tiu diskuto! Viaj voĉoj ja gravegas por la prospero kaj evoluo de UEA, nun kaj estonte.

Elkore kaj estime,

D-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA




PROJEKTO DON QUIJOTE

Kiel ni informis en pasinta numero de *Boletín*, la 1an de julio, en Herrera del Duque, en la kadro de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis prezentita la bita eldono de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha", la kompleta traduko al Esperanto de la verko de Miguel de Cervantes eldonita de Hispana Esperanto-Federacio.

HEF ricevis la konfirmon ke la projekto estis selektita kiel unu el la eroj de la oficiala programo de la Ŝtata Komisiono por la kunmemoro de la 400a datreveno de la morto de Miguel de Cervantes.

La verko estas alirebla ne nur en reta formato, sed ankaŭ, kiel ni informis, la interesatoj povas akiri tre oportunajn kartojn kun konekto USB, enhavantajn la dosieron de la libro, kaj kun tre belaj kovriloj. La kartojn eblas aĉeti ĉe HEF kaj ankaŭ en la Libroservo de Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ la grupoj membroj de HEF disponas je ekzempleroj de tiuj karto; se via grupo ne ricevis ilin, bv. kontakti kun la sidejo de HEF.



HEF faris ankaŭ internacian disvastigon de la projekto. Konkrete, la libro-dosiero kaj la karto estis konigitaj al la internacia esperantista publiko dum la programo pri novaj eldonoj de la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Nitro (Slovakio) fine de julio. Krome, dum la Festivalo "Artaj Konfrontoj en Esperanto" (ARKONES) kiu disvolviĝis fine de septembro en Poznano (Pollando), la antaŭa sekretario de HEF Félix Jiménez Lobo prelegis pri "Don Quijote de La Mancha" kaj prezentis la novan bitan eldonon en Esperanto.

Ni esperas fari prezentadon al la ĝenerala publiko neesperantisto, en institucio rilata al la hispana literaturo, dum la lasta jarkvarono de 2016, kaj invitas la grupojn diskonigi la verkon en siaj urboj profitante la datrevenon de la verko. Kontakti la oficejon se vi bezonas kunlaboron.

La Estraro

KOLOKVO DUM LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La lundon 26-an de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, lanĉita de la Konsilio de Eŭropo, HEF organizis en sia sidejo malferman kolokvon pri «La lingva situacio en la eŭropaj institucioj post la ‘Briteliro’».

La enkondukintoj en la kolokvo estis: José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF, Ricardo Albert Reyna, profesoro de la Aŭtonoma Universitato de Madrido kaj tradukisto, kaj Manuel Pancorbo Castro, profesoro de la UNED kaj direktoro de Fundación Esperanto.

José Antonio del Barrio faris ĝeneralan enkondukon. Li parolis pri la lingva situacio nuntempe en la Eŭropa Unio, kiu povas esti resumita per la frazo ke “ĉiuj lingvoj estas egalaj, sed iuj estas pli egalaj ol la aliaj”, tio estas, la konstato pri la fakta superrego de la angla lingvo en ĉiuj institucioj kaj en ĉiuj praktikaj okazoj, krom je tre supera nivelo. La nova situacio, ke la Unuiĝinta Reĝlando aprobis sian eliron el la Unio signifas ke fakte malpli unu procento de la loĝantoj en EU havos la anglan kiel denaskan lingvon, kaj ankaŭ ke la lando kiu proponis tiun lingvon kiel oficialan ne plu partoprenos ĝin. Li konstatis ke probable tio ne havos klarajn tujajn leĝajn sekvojn, ĉar la superrego de la angla havas aliajn kaŭzojn. Ni konstatas tamen ke malfermiĝis debato en la ĝenerala socio, interalie inter iuj politikistoj de diversaj landoj, kiuj ŝatus vidi pli da lingva diverseco en la Unio. Kvankam ne estas antaŭvideble ke Esperanto tuj havos gravan rolon, oni observas ian malfermon al la rolo de nia lingvo, ekzemple, per la okazigo de Lingvopolitika Konferenco “Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio”, paralela al la Universala Kongreso de Nitro kaj kunsponsorita de la slovakaj aŭtoritatoj, en kiu partoprenis eŭropa komisararo Vytenis Povilas Andriukaitis, per prelego tute prononcita en Esperanto, kaj ankaŭ per la partopreno en la UK de aliaj eŭropuniaj aŭtoritatoj. Estas do nia tasko kontribui al tiu ĝenerala debato, kaj profiti tiun senteblecon.

Ricardo Albert parolis pri la minoritataj kaj neoficialaj lingvoj, kaj ilia rolo en Eŭropo. La debato pri lingva justeco kaj lingvaj rajtoj estas tre kompleksa, kaj la solvo ne estas facila, sed oni devas tre konscii pri la maljustaĵoj kiuj trafas la civitanojn en Eŭropo kaj ene de ties landoj.



Manuel Pancorbo fokusigis en la rolo de la angla lingvo en la scienco. Se en iuj historiaj momentoj ekzistis multlingvaj ekvilibroj, nun la angla estas absolute superreganta. Eĉ se teorie oni povus imagi ke la angla perdu gravecon en la Eŭropa Unio, en la kampo de la scienco tute ne eblus elturniĝi sen la rolo de tiu lingvo, pro la nunaj dinamikoj. La rolo de Esperanto en tiu kampo ne baldaŭ kreskos, interalie pro la mankoj de terminologia kohereco je kiu nia lingvo ankoraŭ suferas.

Poste malfermiĝis debato inter la ĉeestantoj. La kolokvo kaj debato okazis en Esperanto, kaj oni diskutis pri la realo kaj la eblecoj modifi la nunan ordon. Ĝenerale oni konstatis ke la lingva ordo ne tuj ŝanĝiĝos en la senco kiun ni dezirus, sed tamen malfermiĝas eblecoj por krei debaton kaj konigi la proponon de pli justa ilo, kiel Esperanto.

HEF

PREMIOJ DUM LA UNIVERSALA KONGRESO

Dum la Universala Kongreso en Nitro (Slovakio) estis anoncitaj la premioj kiujn ĉiun duan jaron donas la Fondaĵo Antoni Grabowski, por elstaraj agadoj en Esperantujo. Ĉijare la duan premion (kiu inkludas monan rekompencon de 300 US-dolaroj) ricevis Hispana Esperanto-Federacio pro (ni citas el la komuniko de UEA) «Bitoteko, sia elektronika biblioteko, per kiu ekde 2013 elstaraj verkoj estas facile kaj senkoste alirebligataj al la publiko – laste, okaze de la 400-a datreveno de la morto de Miguel Cervantes, Donkiĥoto en la traduko de Fernando de Diego.» La premion ricevis surloke la vicprezidanto de HEF, Ángel Arquillos.

Krome, dum la sama Kongreso estis anoncitaj la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj ĉijare bona kolekto venis al Hispanio. Konkrete, la unuan premion en la branĉo Poezio ricevis Antonio Valén, pro “Paralele”. En la branĉo Eseo, la duan premion ricevis Jorge Camacho Córdón, pro “La vartisto de vortoj”. En tiu sama branĉo ricevis trian premion kaj honoran mencion Suso Moinhos Pardavila, kvankam tiu ĉi poste rezignis la premiojn. La diplomojn surloke transprenis Toño del Barrio, nome de la gajnintoj.

Jam eblas aĉeti la libron kun la premiitaj verkoj, "Belarta rikolto 2016", en la Libroservo de UEA.



76A VENONTA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN TERUELO

Estu kore bonvenaj al la urbo Teruelo! Ĉi tiuj estu la unuaj vortoj kiujn vi aŭdos en la malfermo de la 76a kongreso de HEF.

Historio de nia urbo. Teruelo estas urbeto, la plej malgranda provinca ĉefurbo de Hispanio, kaj nur enhavas 35.000 loĝantojn. La urbo troviĝas sur malgranda altaĵo, preskaŭ 1.000 metrojn super la marnivelo, en la sudo de la komunumo de Aragono, kie la riveroj Guadalaviaro kaj Alfambro kunfluas. Tie, la iberianoj fondis lokon nomitan *Turboleta*. La romia ĉeesto ne lasis remarkindajn spurojn en la urbo, krom duon-subteran akvedukton 18 kilometrojn longan en la ĉirkaŭaĵo. Ne multe ni scias pri la islamaj tempoj: la loĝ-areo estis nomita *Tirwal* sed nenio restas el ĝi.

La nuna Teruelo komencis formiĝi en 1171, kiam la aragona reĝo Alfonso la 2-a *La Ĉastulo* konkeris ĝin. Ekde tiam, Teruelo estas urbeto aragona kaj eble tro ĉasta. La kristana repopulado ebligis dum jarcentoj la kunekzistadon de tri homaj komunumoj, kristana, juda kaj islama ("mudehara"). Ĝis ilia elpelo, la judoj ĉefe laboris kiel komercistoj kaj la islamanoj sin okupis pri multaj manlaboroj, kiel dezajni kaj konstrui la belajn turojn de la urbo.



Dum la unua duono de la dekaŭa jarcento Teruelo eltenis la Napoleonan invadon kaj la Karlistajn Militojn. Anstataŭe, la dua duono de la jarcento estis periodo kun iom da prospero, kulinante en la komenco de la dudeka jarcento, kun la konstruado de modernismaj verkoj kaj la alveno de la fervojo.

Dum la Hispana Civila Milito, Teruelo estis la sola provinca ĉefurbo el la ribelita zono konkerita de la respublikana armeo, kaj poste rekonkerita de la puĉistoj. La du bataloj (decembro 1937 kaj februaro 1938), estis ekstreme violentaj, kaj dispecigis en ruĵaĵojn la plejparton de la urbo.

La rekonstruo estis malrapida kaj doloriga, sed permesis la reorganizon de la urbo. Post la milito alvenis la popol-malkreskado: la ekonomia bazo malfortas kaj multaj junuloj elmigras al aliaj urboj por serĉi pli bonajn ŝancojn.

Esperanto en Teruelo. Danke al Antonio Marco Botella ni scias ke la unua stabila grupo de Esperantistoj en Aragono estis fondita dum la jaro 1903 ĉe Albarracino, 25 km. for de Teruelo. Grupo en Teruelo estis fondita baldaŭe, kiu luis lokalon en la strato San Juan.


La plej remarkinda esperantisto kiun havigis la urbo ĝis nun estas la arkitekto Francisko Azorín, kiu naskiĝis en vilaĝo en la provinco en 1885, kaj vivis en la urbo ĝis 1912.

Antaŭ kvar jaroj, danke al la laboro de la najbara asocio "Sankta Juliano" personoj interesitaj pri Esperanto komencis kunveni. La grupo plifirmiĝis, kaj antaŭ kelkaj monatoj ni decidis krei la Esperanto-Asocion de Teruelo "Liberanimo" ene de HEF. Ni ĵus rekomencis la kurson de Esperanto en loko kiun prunedonas al ni la "Lernejo por plenkreskuloj" de Teruelo.

Kion trovas la partoprenantoj en la Kongreso de Teruelo? Mi ne donos multajn detalojn pri la aĵoj el nia urbo kiujn ni montros al vi (monumentojn, pejzaĝojn ...). Mi preferas instigi vin veni kaj vidi per vi mem la mudeharajn turojn, kristanajn preĝejojn kaj modernismajn konstruaĵojn. Ni montros al vi akvedukton kaj viaduktojn kiuj kuniĝis la diversajn kvartalojn de la urbo. Ni rakontos al vi pri la legendo de la Geamantoj de Teruelo kaj pri la Batalo de Teruel. Vi manĝos kaj trinkos plengustajn nutraĵojn, manĝaĵojn de paŝtistoj, trinkaĵojn de la stepo.

Teruel estas la sola provinca ĉefurbo de Hispanio kiu ne havas trajnservon ĝis Madrido. Ni kredas ke vi ŝatos Teruelon tielmaniere ke vi foriros dirante: "Kia izolita urbo estas Madrido, ĝi ne havas trajnon al Teruelo!"

Alberto Granados, grupo "Liberanimo"



ANONCOJ KAJ NOVAĴOJ EL AGADOJ DE NIA JUNULARA SEKCIO

Ĉi tie mi priparolas laŭ-alinee pri jenaj temoj: hispana mapo, tutmonda mapo, babadum-ludo, ReVo, Duolinkokurso, HEJS-retejo, Erasmus+, mentora programo, TEJO-posteno, 3000€-premio por retejigo.



Nia hispania mapo ĉe www.bit.ly/mapaESeo plukreskas kaj mi feliĉas vidi ke plimulto el novaj mapuloj elektas ekricevi la bitbultenon. Mi ankoraŭ devas krei bitbutenecan mesaĝon por kaj novaj mapuloj (dirante ke ili ĵus estis enmapigitaj kaj jen ligilo al la mapo) kaj por la malnovaj (memorigante pri la mapo, pri ilia ĉeesto kaj indeco ĝisdatigi informojn se io ŝanĝiĝis, ekzemple loĝloko).

Ni ankaŭ feliĉas sciigi vin pri nova map-retejo, jam tutmonda kaj interaga, farita de freŝbakita brita esperantisto. Jam pli ol 1200 esperantistoj aliĝis ĉe <http://esperantujo.directory> kaj 53 el ili loĝas en Hispanio. Ĝin iam mi ŝatus imiti por migrigi nian landan google-mapon kaj aŭtomatigi aferojn, tiel ke ĉiu uzanto havu mem rajton krei konton kaj enmapigi, ŝanĝi siajn datumojn, mesaĝi aliajn, kaj roboto fojfoje demandu ĉu io ŝanĝiĝis por havi ĝisdatan mapon. Pro teknikaj nekapabloj tio restos farota plano, espereble ne tro longe.

Babadum.com estas bela retejo por lude lerni vortojn en pluraj lingvoj, inter ili lastatempe ankaŭ en Esperanto! Tio estas rezulto de kunlaborado inter Suso Moinhos, Alejandro Escobedo (t.e mi), kune kun alilandanoj Szilva Szabolcs, Dóra Zsuzsanna Szilva, Przemysław Wierzbowski, Natalia M. Żebrowska.

Nuntempe HEJS havas planon kunordigi kompletigadon de reta vortaro hispane www.reta-vortaro.de/revo per oftec-radika listo rete konsultebla kaj modifebla, kie ajna hispanlingva esperantisto rajtas alpreni taskon laŭ volo, scio kaj tempo por faciligi aferojn al uzantoj de tiu vortaro havebla eĉ androide (Prevo), ĉefe por venontaj duolingvanoj.

Pri Duolingo kion diri... Jam de komenco de aŭgusto la kurso pretas sed atendigemaj programistoj ankoraŭ ne lanĉis ĝin, kaj ja multaj atendas ĝin senpacience por lude eklerni aŭ plulerni Esperanton. Ni esperas ke la nombro de kursanoj pli malpli samos al tiu el la angla, kie jam duonmiliono da homoj eklernis la lingvon kaj almenaŭ po 30 homoj finlernas la tutan kurson ĉiutage.

Nun ni parolu pri Erasmus+ kaj HEJS, kiu eniris en gravan projekton kun TEJO kaj aliaj junularaj e-asocioj por trejniĝi eŭrope pri komunikado al junularo. Detaloj venos al HEJS post kelkaj tagoj sed ni bezonos sendi du junulojn almenaŭ, HEJSajn (do rapide diru al viaj junaj konatoj ke ili eklernu E-on kaj aliĝu kontraŭ 20€) kun senpagaj subvenciitaj vojaĝo kaj loĝado ĉe diversaj e-eventoj en Eŭropo. De la 28 ĝis 31a oktobro okazos la unua evento en Nederlando, KKPS. Postaj okazos en marto, julio kaj semptebro. Temas pri bonega ŝanco lerni, vojaĝi kaj eĉ pavi aŭ pliriĉigi sian vivresumon (sekcio pri farita volontulado kaj trejnado). Mi persone intencas iri al la nederlanda sed pro personaj kialoj mi ne certas ĉu eblos, do tion mi vidos. HEJS julie profitos la okazigon de hispana kongreso en Teruelo por tiam okazigi sian trejnadon, do ni ĝoje jam kalkulu kun pli malpli 12 partoprenantoj el pluraj landoj.

Pri TEJO ni indas scii pri ĝia Mentora Programo <http://tejo.org/lingva-mentorado> . Temas pri projekto por mentori freŝbakitajn esperantistojn proksime de vi. Ili senpage petos tiun servon, amikan gvidadon dum ilia lernoprocezo por krei ligojn, instigi ilin al plulernado kaj amikiĝado internacie. Multaj el ni certe samopiniis ke homo kiu lernas izolita ofte forlasas nian lingvon pro soleco kaj senmotiviĝo. Ja estas tio granda problemo kiu solveblus per bonnivelaj esperantistoj kiuj pretus mentori jare kvin homojn ekzemple, laŭ organizita listo kaj ebloj.

Kaj nu, iom miisme mi anoncu ke mi ŝanĝis mian postenon ĉe TEJO. Mi estis Komisiito pri Aktivula Trejnado kie mi malmulton sukcesis komisiu pro laborfortaj kaj sciaj mankoj, kaj finseptembre mi transiris al posteno Eŭropa Komisiito, kie demandadi eŭropajn asociojn por vidi kiel TEJO povus helpi ilin, kaj kune kun aliaj kontinentaj komisiitoj nia komisionaro helpu ĉe tiuj problemoj kaj malfacilaĵoj. Ni vidos, sed mentora programo, kaj pretigata bonkvalita ŝablono por oferti retejojn al ajna asocio estas parto el tiuj novaj servoj prilaborataj.

Fine, por legantoj kiuj scias krei retejojn bele aŭ por ties konatoj, mi informu ke UEA defias retejistojn plibonigi renovigatan paĝon esperanto.net ĝis la 17a de oktobro. Tiu kiu sukcesos ricevos 3000€. Pli da informoj ĉe <http://forumo.esperanto.net/index.php?topic=41.0>

Jen la finon vi atingis de ĉiuj informoj lastatempaj. Havu belan monaton kaj multe parolu al junuloj pri nia kara lingvo kaj pri mojosiganta HEJS :D kaj se vi havas konsilon, ideon aŭ similaĵon rilate al junulara agado hispanie, bonvolu kontakti nin ĉe hejs@esperanto.es .

Alejandro Escobedo

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

ANKORAŬ estas tempo aliĝi al la 20a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazonta de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro en la bela urbo Antequera.

Jen ligilo kie vi trovos ĉion necese por aliĝi kaj legi la programon:

<https://andaluciaesperanto.wordpress.com/>

Aragono

LA NEPOJ VIN BENOS... FRANCISKO AZORÍN

Francisko Azorín Izquierdo (1885-1975) grava esperantisto, ricevis nian omaĝon en Zaragozo okaze de ekspozicio en "Biblioteca de Aragón" de Zaragozo (str. Doctor Cerrada, 22).

F. Azorín naskiĝis en Monforte de Moyuela (Teruelo), translokiĝis al Kordovo. Post la fino de la milito li estis ekzilita en Meksikon, kie li aktivis en la esperanta agado. Bedaurinde li neniam povis reveni al Hispanio.

Li estis progresema homo, li laboris kiel arkitekto kaj estis politiko de la socialisma partio kaj parlamentano.

Li multe aktivis en la esperanta agado. Li estis membro de SAT kaj partoprenis diversajn kongresojn.

En Meksiko, li laboris kun Lanti, de kiu li fariĝis testamenta administranto.

Li verkis diversajn librojn. Rilate al esperanto:

-*Adamo kaj Eva* (dramo en tri aktoj, 1954)

-*La lengua auxiliar internacional Esperanto: curso completo en 10 lecciones* (1924)

-*Universala Terminologio de la Arkitekturo* (oklingva, ilustrita per 2000 desegnoj, la klariga lingvo estas Esperanto, 1932)

-*Ilustrita vortaro de Esperanto* (1955).

En la inaŭguro ĉeestis kelkaj familianoj (nepino, nepo kaj pranepo) alvenintaj de eksterlande. La prezidantoj de E-grupoj de Zaragozo kaj Teruelo profitis por saluti ilin. Unu el la nepoj (Ernesto) estas esperantisto (kiel la patro kaj la avo) kaj dankis ĝentile en Esperanto.

Lorenzo Noguero



Asturio

ASTURA ESPERANTA ASOCIO pretas gvidi E-kurson, en nia sidejo de la Universitata Areo de Vieskes (Gijón) al interesitoj pri la afero. La tagoj de la semajno kaj la horaro povas esti akorditaj laŭ la konveno de la lernontoj. Samideane kaj amike,

Faustino Castaño.

Kanariaj Insuloj

Tenerifo

Quaerendo estas tenerifa asocio, komence ligita al Universitato de La Laguna, por disvastigo de scienco kaj kulturo en amuza maniero. Ili faras mallongajn filmojn pri plej diversaj temoj. Ilia hejmpaĝo estas www.quaerendo.org. Fine de la pasinta jaro ili kontaktis nin por proponi fari kun ni, pri Esperanto, unu el tiaj filmetoj en nia klubo de La Laguna. Ni volonte akceptis kaj iun tagon de marto venis membro por intervjui kelkajn societanojn, filmi diversan grafikan materialon ks. Okaze de la datreveno de la publikiĝo de Esperanto, ili eldonis sian filmon ĉe Youtube, kie ĝi tuj atingis rekordan (por ili) nombron da vizitoj.

Filmon oni trovu per iu ajn serĉilo aŭ rekte ĉe: <https://youtu.be/jD2xNgK1Vk8>

La Esperantista Societo de Tenerifo ĝojas pro la rezulto, kiu montras teknike profesian nivelon, allogan muntadon kaj nebanalan skripton. Ni volas publike esprimi nian dankon al Quaerendo pro ĝia malavara intereso kaj ni invitas hispanajn samideanojn fari same.

ESTO

Katalunio

SUKCESE DISVOLVIĜIS EN LA URBO CAMBRILS LA 23A INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

Plian fojon ĉi tiu konata loko estis taŭga por ĝui novan Internacian Semajnon de Kulturo kaj Esperanto en Katalunio. Cambrils denove akceptis nin, kaj skabenino pri Kulturo salutis la ĉeestintojn en tiu 23-a Internacia Semajno en luksa kvarstela hotelo, kie ne mankis bonkvalitaj manĝaĵoj, komfortaj ĉambroj, spektakloj, naĝejo, ktp. malgraŭ neĉeesto de la lasta fondinto de la evento, Luis Serrano, kiu falis kaj bezonis kuracistan helpon. Kelkaj el ni kontaktis lin kaj mi povas certigi ke li fartas bone. La Semajno sukcesis kaj ni jam planas pretigi novan en alia ĉemara urbeto, eble en Tossa de Mar, ĉar estas grupeto da homoj, kiuj pretas sindoneme kunlabori por daŭrigi la internacian renkontiĝon.

Nekrologe

La 20-an de junio, subite pro infarkto dum promenado, forpasis nia kara samideano Manuel Santana Navarro, multjara membro de HEF kaj UEA-delegito en Las Palmas de Granda Kanario.

Li estis 80-jara kaj profesie ŝipmakleristo. Li estis esperantisto jam de la 50aj jaroj. (La apuda foto montras lastatempan kunvenon de la samideanoj en Granda Kanario; Manolo estas la homo plej dekstre de la foto)



La 21-an de julio forpasis en Badahozo nia samasocio Ildefonso Sánchez. Li estis 101-jara, sed sufiĉe vigla mense ĝis la lasta momento, laŭ atesto de la familio.

Ni kondolencas iliajn familion, amikojn kaj samideanojn.

Krome kaj bedaŭrinde, koincide en la du monatoj forpasis pluraj internaciaj eminentaj esperantistoj:

La 6an de aŭgusto forpasis Paul Gubbins, konata brita esperantisto, instruisto, verkisto kaj ĵurnalisto, redaktoro de “Monato” kaj “La Brita Esperantisto”, aŭtoro de pluraj Esperanto-teatraĵoj kaj de la populara vidkurso “Esperanto – Pasporto al la tuta mondo”.

La 20-an de aŭgusto forpasis Detlev Blanke, lingvisto, renoma specialisto pri Interlingvistiko, aktivulo en la orientgermana Esperanto-movado.

Reinhard Selten forpasis la 23-an de aŭgusto. Li estis gajninto de la Premio pri Ekonomiko honore al Alfred Nobel en 1994 kaj aŭtoro de pluraj libroj en Esperanto, interalie pri la fako de teorio de ludoj. En 1996 li vizitis Hispanion danke al la klopodoj de la murciaj esperantistoj, kaj prelegis en tiu urbo, en Esperanto kun traduko al la hispana.

La 29an de septembro 2016 post longa suferiga malsano forpasis Reinhard Haupenthal, elstara esperantologo, interlingvisto, tradukisto kaj eldonisto.

KOMUNIKADO DE HEF KAJ SOCIAJ RETOJ

Estas preskaŭ banale substreki la grandan revolucion trapasitan en la maniero kiel esperantistoj komunikas inter si, kaj specife, kiel Hispana Esperanto-Federacio povas komuniki kun siaj anoj. Se antaŭ ne tiom da jaroj, la ĉefa maniero sciigi informojn en nia asocio estis la “Boletín” kaj la kongresoj, kaj plej ofte necesis ordinara poŝto por interŝanĝi informojn kaj ideojn, nun plimultiĝas la manieroj interkomunikiĝi.

Foje, la manieroj estas tiom multaj, ke eble iuj el la anoj de la asocio eĉ ne scias kiuj estas la plej taŭgaj en ĉiu kazo, kaj ne konas ĉiujn. Ĉar la estraro de Hispana Esperanto-Federacio deziras plibonigi la interrilaton kun la anoj kaj la lokaj grupoj, kaj ankaŭ kaj ĉefe kun la homoj alproksimiĝantaj al la lingvo, ni volas rememorigi kelkajn el tiuj kanaloj, kaj disvastigi la atingojn.

Kompreneble, ni devas komenci per “Boletín” mem. Tiurilate, ni memorigas ke krom la papera eldono kiun vi ricevis, ni produktas elektronikan version en formato pdf, kiun povas ricevi ĉiuj anoj, se dezirate. Fakte, ĉiuj numeroj de nia bulteno, de la komenco de la eldonado, estas senpage elŝuteblaj de iu ajn esperantisto en nia reta deponejo, la Bitoteko <http://bitoteko.esperanto.es/>. Nur la kvar lastaj numeroj estas rezervitaj al niaj anoj, kaj ilin ĉiuj vi povas trovi en la interna spaco de la retejo. Se vi neniam eniris en tiun spacon, simple sendu mesaĝon al nia retejestro ĉe la adreso esperanto@esperanto.es kaj vi ricevos la permeson kaj proceduron. Notu ke vi povos legi la bultenon eĉ antaŭ la presado kaj la alveno al via hejmo!

Tre grava kaj jam firma estas nia *Bitbulteno*, la reta novaĵletero, kiun eblas ricevi libere, kaj kiun ni eldonas unu fojon monate, en Esperanto kaj la hispana lingvo (kaj eĉ foje en aliaj lingvoj, kiam tio eblis). La Bitbultenon ricevas nun pli ol 800 homoj, ĉefe el Hispanio, plejofte ne membroj de HEF, foje eĉ ne parolantaj la lingvon, sed kiuj volas ricevi novaĵojn pri Esperanto en nia lando. Se vi ankoraŭ ne ricevas ĝin, sendu retmesaĝon al letero@esperanto.es por ĝin aboni. Ankaŭ al tiu adreso vi povas sendi viajn informojn, kaze ke vi deziras ilin disvastigi inter la esperantistoj kaj simpatiantoj de Hispanio.

Nia retejo <http://www.esperanto.es/> estas ofte aktualigata. Ĝi estas unu el la plej belaspektaj kaj facile legeblaj retejoj en Esperanto, danke al la laboro de niaj retejestroj, kiuj faras tre gravan eĉ se foje ne tre videblan laboron. Speciale grava estas la aktualigo de nia Bitoteko, kaj la senpaga disponigo de la Granda Vortaro de Fernando de Diego, libere alirebla de ĉiuj interesigantoj. La paĝo ricevas pli ol 2.000 vizitojn semajne, kio ne estas malbona nombro por esperantista retejo.

Ni ne forgesu la retlistojn. Estas pluraj, diverscelaj, sed por diskuti pri aferoj rilataj al nia asocio, la oficiala estas la listo “HEF-anaro”, en servo Yahoo-groups: <https://es.groups.yahoo.com/groups/hef-anaro/>. Kelkaj homoj ne ŝatas retlistojn, ĉar en kelkaj aperis en la pasinto tro multaj informoj kaj diskutoj, sed tiu ĉi estas nur por HEF-aferoj, kaj estas tre limigita, kaj do ni instigas vin aliĝi, ĉar ĝi estas la plej rapida maniero per kiu membroj de la asocio povas kontakti ĝenerale kaj kun la estraro. Vizitu tiun adreson, aŭ kontaktu kun la Federacio, por vidi kiel aliĝi kaj partopreni facile.

Ni multe flegas nun la sociajn retojn, tiom uzatajn nuntempe. Nia paĝo en Fejsbuko (*Facebook*) <https://www.facebook.com/esperanto.es/> havas pli ol 1300 “ŝatantojn”. Nia tuitera (*Twitter*) konto <https://twitter.com/esperantoes> havas ĉ. 850 “sekvantojn”. Ili montriĝis bonaj manieroj komunikiĝi kun membroj kaj simpatiantoj, kaj ankaŭ porti nian mesaĝon al aliaj interesitoj. Ni provas regule, sed ne tro ofte, aktualigi ĝin, en la hispana same kiel en Esperanto, kaj ambaŭ estas du bonegaj montrufenestroj de nia aktivado. Ankaŭ HEJS, nia junulara sekcio, flegas siajn proprajn kontojn, eĉ pli aktivajn kaj dinamikajn, kiujn ni invitas regule viziti kaj abonati, eĉ se vi ne plu estas tiom juna.

Aparta mencio meritas nian kanalon en Jutubo (*Youtube*) <https://www.youtube.com/esesperanto>, kie ni publikigas regule filmetojn rilatajn al Esperanto kaj nia agado. Ni povas fieri ke, kune kun aliaj kanaloj prizorgataj de Liven Dek, ili troviĝas inter la plej bonkvalitaj nuntempe en nia movado. Meze de oktobro 650 subskribantoj sekvas ĝin, kaj ĝi ĝuis jam pli ol 70.000 spektadojn (sen enkalkuli aliajn koneksajn videojn, el inter kiuj nur la filmo kun la kanto “La pluvo”, de nia arunda kongreso, estis spektita jam pli ol 30.000 fojojn)

Fine, kaj kiel plej nova kontaktomedio, ni malfermis kanalon en la mesaĝilo *Telegram*, por aktivuloj kiuj deziras reagi rapide, ne por babilo, sed por kune aktivati. Se vi utiligas tiun aplikaĵon, serĉu la grupon “hispana agado”: vi estos tie tre bonvena, kaj vi espereble trovos la manieron pli intime kontakti nian asocion kaj nian movadon.

HEF estas ni ĉiuj, ne mankas manierojn tion profiti.

José Antonio del Barrio

POEZIA ANGULO



"Paul Gubbins"

En dormo li mortis,
surprize kaj pace,
eble songante pri neverkitaj verkoj.

Amiko de plej multaj,
ĉiam ronde sprita, humurplena,
kun afabla rideto tutvizaĝe.

Mi memoros lin kiel lastfoje, kun supla sunĉapelo
laŭreklame faldebla poŝen
kaj elfekebla sendifekta se elefanto ĝin digestis.

Jorge Camacho

KRONIKOJ PRI LA TAJFOJ DE BADAJOZ

La tajfo-regno de Badajoz, kiu situis inter tiuj de Toledo kaj Seviljo, estis sufiĉe grava, ĉar ĝi enhavis dum la Mezepoko, krom vastaj teritorioj, grandajn urbojn kiel Lisbono, Merido, Santarem, Koimbro, ktp. Formiĝis tiu regno kiam dum la ribelo de Kordova, sklavo de la kalifo Al-Hakam la 2^a nomata Säbur konkeris Badajoz, Santarem kaj vastajn teritoriojn de la Malsupra Landlimo kaj sendependiĝis dum la unuaj jaroj de la terura “fitna” (intercivitana milito).

Kiam Säbur forpasis, unu el liaj kunlaborantoj, Abd Alläh ibn Muhammad ibn Maslama, kies alnomo estis ibn al-Aftas sin proklamis unua reĝo de la tajfo de Badajoz en la jaro 1022, kun la honora titolo Al-Mansur. Forpasis tiu ĉi reĝo en la jaro 1045, kaj okupois la tronon lia filo Muhammad al Muzafar, bona soldato, laŭdinda administranto, erudicia homo kaj talenta poeto.

Malgraŭ la konstantaj militoj, kiujn li devis subteni, en la nordo kontraŭ la kristanaj trupoj kaj sude kontraŭ la Sevilja Abbada regno, li atingis pacajn prosperajn periodojn kaj dum ili, lia kortego, akiris grandan prestiĝon kiel unu el la plej favoraj pri la protektado de sciencistoj kaj poetoj. Tial, estis multenombraj la intelektuloj, kiuj vizitis lin. Elstara poeto li mem kaj tre kompetenta por prijuĝi poezion, la tiuepokaj kronikoj mencias lian postulemon por la bona poezio, tiel rigoran, ke en la beletraj festoj de sia kortego li ne volis aŭskulti poetojn, kies poezio estis malpli altnivela ol tiuj analogaj de Oriento. Al-Muzaffar estis aŭtoro de grava verko pri beletraj kaj historiaj temoj titolita “al-Muzaffa-ri”, konsistanta el 55 volumoj.

Post la forpaso de al-Muzaffar en la jaro 1068, la regno Badajoz vivis krizajn tagojn, ĉar du el la filoj de la forpasinta reĝo, Yahyā kaj Umar, disputis pri la regado de la regno. Fine, post la morto de Yahyā, Umar sin proklamis reĝo kaj prenis la honoran titolon al-Mutawakkil. Baldaŭ la ĉefurbo Badajoz fariĝis “sidejo de beletro, scienco, gramatiko kaj precipe de la poezio”. Poeto li mem, tiama kroniko rakontas, ke en certa okazo li invitids kmorteganon al festo per jenaj delikataj versoj:

Venu al mi Abū Tälüb,
venu al mi kiel roso,
venu brila kiel perlo,
kiam venas la aŭroro.
Kvazaŭ kolier’ ni estas,
Sed por ĝusta art-valoru,
meze de ĝi mankas perlo,
kiun certe ni retrovos,
kiam tie ĉi veninta
vi respondos nian vokon.

Umar al-Mutawakkil estis la lasta reĝo de la dinastio. Li rezistis ĝis la jaro 1094, kiam, venkita de almorabidoj, li estis mortigita kune kun sia tuta familio.

Elstara poeto de tiu regno estis ankaŭ Abū Bakr Abd al-Azziz ibn Said ibn al-Qabturnuh, sekretario de la reĝo Mutawakkil. Maqqari citas ĉi tiujn versojn verkitajn de la poeto, kiam li volis peti falkon al la reĝo:

Ho, vi! Moŝta saĝa reĝo,
kies antaŭiloj bravaj
montris ĉiam fieron
de la homoj senkomparaj.

Vi ornamis mian kolon
per honoroj la plej altaj,
metu nun sur mian manon
kun sinteno malavara:
falkon, unu ekzempleron
el ĉasbirdoj plej ŝatataj
kun ungegoj kaj flugiloj
tre potencaj, tiel grandaj,
ke se ilin ĝi agitas
norda vento tre sovaĝa
ŝajnas veni el mondfino
kun la forto uragana.

Volu vi, sinjoro moŝta
doni al mi korafabla
tiun falkon, kun plaĉe
ĉasocele kunportata
de l' herbej' kaj branĉoj skuos
perlojn kun beleco rava.

Mi kunportos ĝin matene
sur la mano mia, stara,
preta por subita salto
sur ĉasaj' avidcelata.

Montros falkon mi, fiera
princdonac' de homo fama!

Abū Bakr al-Qabturnuh forpasis en la jaro 1126.


Proksime de la urbo Badajoz, Mutawakkil ordonis konstrui belan kampodomon, nomatan “La Mirinda” kaj en ĝi ripozis ofte la reĝo inter arboj kaj vegetaĵoj, okazigis bankeadojn aŭ kunvenis kun la poetoj, precipe kun ambaŭ fratoj al-Qabturnuh, ĉar, krom la ĵus citita Abū Bakr, lia frato, Abū-l-Hasan ibn Said ibn al-Qabturnuh, estis ankaŭ elstara poeto. La prestiĝa antologiisto al-Fath ibn Jāqan citas jenajn versojn de tiu ĉi al-Qabturnuh:

Kun huriaj brilokuloj ŝi promenis sen soleno
inter belaj amikinoj kun brokita silkovesto
kaj brodaĵoj orfadenaj de strekita luksmantelo.
Kiam ŝin mi ekrenkontis, timis ŝi la agresemon
de fervora nov-amanto pro juneca sangimpeto.
Surprizita, ŝi hezitis, sed reagis post momento
Kaj al ŝia amikino diris ŝi per konfidenco:
“Al amanto mia diru, ke li venu kun prudento
kaj mi kaŝe renkontiĝos, kiam nokt-tenebro venos.
Zorgu li nur pri perfidoj, kaj alies scivolemon
ni profitos, kiam sonĝo kaptos ĉiujn en dormretoj
kaj veluroj kovros lunon inter ombroj kaj silento ».

Post despera atendado mi atingis mian celon,
 la parfum' de ŝia korpo enkondukis min al nesto.
 Ĉirkaŭbrake dolĉpremitaj ni ĝuadis amkaresojn,
 ni elĉerpis la pasion kaj la flamon de la sentoj.
 Nur ĉe zorgo pri amoro nin surprizis aŭror-heloj,
 kvazaŭ brilaj blankaj haroj sur la nigra noktbeleo!

Badajoz kaj ĝiaj verdaj ĉirkaŭaĵoj inspiris multajn poetojn de la epoko de Mutawakkil. La veziro Abū Amr ibn al-Fallās verse skribis:

Badajoz...
 Ho vi, urb' el miaj revoj,
 kiom vin ja mi admiras!
 Certe mi ne vin forgesos,
 Eĉ se de vi malproksima :
 l' arboj, kiuj vin ĉirkaŭas,
 via val' klarverde riĉa
 ŝajnas kvazaŭ bel-mantelo
 de l' river' kapric-tondita.



Antonio Marco Botella (Daŭrigota en venonta Boletín.)



Al niaj amikoj Juan Trenado kaj Katja Kapitonova naskiĝis bebo, kiu ricevis la nomon Andrei. Fortan gratulon al la paro!

LETERO AL LA REDAKCIO KAJ NEFERMITA RESPONDO

En la n-ro 414 de *Boletín*, sur la paĝo 32, sub la titolo *Niaj verkistoj*, legeblas noto, per kiu la Redakcio gratulas ne ĉiujn E-verkistojn de Hispanio, sed nur tri el ili, Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Suso Moinhos, pro la fakto, ke en la unuaj monatoj de tiu ĉi jaro vidis la lumon entute ses libroj el tiu triopo (tri de Miguel Fernández, du de Jorge Camacho kaj unu de Suso Moinhos). Ja tio implicas grandan laboron, kiu meritas nian aplaŭdon. Ĉi tiun same meritis ĝis nun la laboroj de ĉiuj aliaj hispanaj E-verkistoj, kies verkoj, tuj post kiam ili estis publikigitaj, trovis sur niaj paĝoj ĝojan ehon. Plie, el la trio da menciitoj, du el ili (Miguel Fernández kaj Jorge Camacho), prezentis siajn librojn kadre de la 75a HEF-kongreso en Herrera del Duque. Do ni volis informi ankaŭ pri tiu ĉi cirkonstanco.

Sed ni ne povis supozi, ke ĉio ĉi povus igi iun ajn el la ceteraj hispanaj E-verkistoj, kiuj ĉi-jare ne publikigis librojn kaj ne prezentis ilin en la HEF-kongreso, senti sin diskriminaciita. Ne ĉiam, kiam ni laŭdas la laboron de hispana E-verkisto, ni devus menci ĉiujn meritojn de la ceteraj.

Nu, ial nia admirata, respektinda kaj respektata s-ano Antonio Marco Botella montris al ni sian nekontenton per jena mesaĝo, kiun ni reproduktas laŭlitera:

Kara samideano: En la pasinta "Boletín" vi publikigis artikolon titolitan "Niaj verkistoj" sed vi forgesis la librojn de Antonio Marco Botella, kiuj estas: "Kronikoj el la historio de "Frateco" (1983)/"Analoj de la Hispana Esperanta Movado" (du vol.) 1987/ "Sesenta años de Esperanto en Callosa"(1992)/"Lirikaj Perloj de Al-Andalus"(1995)/"Laboristaj Esperantaj Kronikoj"(1996)/"Unu jarcento de Esperanto en Aragono"(2000)/"Esperanto en la Valencia Komunumo"(2001)/"Vivo kaj verkaro de Julio Mangada Rosenorn"(2003)/"La popolstilo de Garcia Lorca"(2004)/"Esperanto en Katalunio"(2005)/"La odisea del "Stanbrook"(2007)/"Crónicas del Movimiento Obrero Esperantista"(2009)/"Episodios y Leyendas Callosinas"(2012)/"Hispana Lirika Antologio"(2014)

Ankaŭ ekzistas 4 libroj ankoraŭ ne eldonitaj. Ekzistas multnombraj prelegoj kiujn mi faris en la ĉiujara internaciaj kongresoj en Katalunio, Kiel okazis ke vi forgesis miajn librojn kvankam jam mi indikis la jaroj kiuj eldoniĝis? Se vi estus legintaj tiujn librojn vi ne bezonus peti kunlaboron Amike

Ja, kvankam en la enhavo de nia noto estas klara, ke ĝi aludas ne ĉiujn hispanajn E-verkistojn, sed nur tri el ili pro la menciitaj kialoj, eble ni malbone elektis la titolon *Niaj verkistoj*, kiu povus esti misgvida. Pro tio ni donas ĉiujn ĉi klarigojn al E-verkistoj ne menciitaj en tiu noto, por la okazo, se iu el ili, krom s-ano Antonio Marco Botella, sentis sin ofendita pro sia neapero en ĝi.

Cetere, unu plian fojon ni volas publike esprimi al nia amiko Antonio Marco Botella nian admiron al li pro la fervora, senlaca kaj sindona laboro, kiun li faris kaj faras sur diversaj agadkampoj de nia afero. Tian apartan respekton ni evidentigis, interalie, publikigante en la n-ro 408 de *Boletín*, Oktobro-December 2014 ne nur artikolon pri la lasta el liaj eldonitaj verkoj, *Hispana Lirika Antologio*, sed ankaŭ foton de la kovrilpaĝo de la libro sur la kovrilo de tiu numero, kion ni ne faris pri iu ajn el la libroj publikigitaj de la cetero de niaj E-verkistoj.

Dankon al vi ĉiuj pro via komprenemo!

La Redakcio

MI ĈEESTIS LA 101-AN UNIVERSALAN KONGRESON EN NITRO (SLOVAKIO)



La 22-an de julio, alveninte ĉe la kongresurbo Nitro, mi spertis ion specialan, mi ne scias kion, eble ĉar mi eniris denove en Esperantion por ĝui tutan semajnon la bonan etoson regantan tie. La unua antaŭkongresa afero estis vizito al la Sinagogo je la 17a h. kie disvolviĝis la unua programo kun la Urbestro de la urbo kaj multaj aliaj gravuloj kiel la prezidanto de UEA, kiuj diris kelkajn vortojn al la ĉeestintoj tradukitaj al la slovaka lingvo de Marek Blahuš por la neesperantistoj ĉeestintaj la eventon. Oni prezentis kelkajn librojn kaj sur la unua etaĝo de la sinagogo, ni gustumis lokan vinon bele etikedita en esperanto, krom bongustajn tipajn dolĉaĵojn; ni ankaŭ ĝuis tre interesan ekspozicion pri Vivo de Zamenhof kaj Historio de Esperanto en Nitro. Tiu estis mia unua kontakto en la bela urbo Nitro.

Kiam mi ricevis la kongresan libron en la granda salono de la kongresejo kaj mi tralegis ĝin, mi ne sciis kiun prelegon aŭ eventon elekti, ĉar mi estis tre komfuzita inter amaso da homoj el 60 landoj, konatuloj kaj nekonatuloj unuigitaĵaj per la sama lingvo. Iom post iom mi trankviliĝis kaj venis la relativa kalmeco, ĉar de tempo al tempo mi renkontiĝis kun konatuloj kaj kun homoj, konitaj per interreto kaj persone, ktp. La unua tago estis tre distra kaj pasis rapide, kaj la ceteraj okazis simile, pliaĵ gesamideanoj kun la sama celo, partopreni la feston de Esperanto. Estus necese multaj paĝoj por rakonti detale la neforgeseblan eventon, sed mi klopodos resumi kun la celo sciigi al vi la plej gravajn momentojn.



La urbo Nitro estas relative malgranda, kaj la kongresejo bone atingebla piede aŭ buse. Mi neniam prenis buson kvankam ĝi estis senpage por la kongresanoj montrante la ŝildon al la ŝoforo, ĉar mia hotelo estis relative proksima kaj la vetero sufiĉe bona por promenado. La menuo pri prelegoj, paroladoj, spektakloj, ktp. estis abunda kaj bonkvalita, eĉ en la korto estis bongusta kaj malmultekosta manĝejo, ĉefe por vegetaranoj kaj trinkejo por trinkemuloj kaj soifantoj. La libroservo esti tre interesa kun novaj kaj ofertoj por ĉiuj legemuloj.

La Movada Foiro estis ege sukcesa kaj vivo-plena. Amaso da homoj en bona etoso vizitis la pli ol cent budojn el diversaj asocioj, kulturaj centroj, eldonejoj, edukaj instancoj ktp. kiuj elmontris varojn, afiŝojn informilojn, fotojn, eldonaĵojn... al la publiko ekster la kongresejo, ĉar la vetero estis tre agrabla. Nia budo reklamis, ĉefe la eldonon de D. Kihoto per bita formato.

De sabato al vendredo, 7 tagoj, se mi ne eraras okaziĝis la sekvaj koncertoj: Senprobleme en Esperanto, E-Familio, Malkaŝita Kaŝi, Dubarda koncerto, Barda sen barbo, Easy Step, Ralph Glomp, Asorti, Ĵele, Martin Wiese, Duopo Slezák, Internacia Koruso, Kim J. Henriksen kaj la lasta koncerta en la ĉefa placo Internacia Muzika Festivalo. Kompreneble ne eblis spektis ĉion, sed la plej bonajn mi certe profitis.

Pri paroladoj kaj prelegoj, menciindas: Prelego pri Solvackio, La mondo de la fratoj Strugackij (M. Bronŝtejn), Ĉendancado por praktiki Esperanton, La blanka Aŭstralio, Gravitaj Ondoj, kaj ĉefe tiuj de Humphrey Tonkin.

Ne mankis teatro ĉe la pordo de la kongresejo, kaj ĉefe en la teatro de la placo prezentiĝis la jam fama verko en Esperanto, *La Kredito*, kiu ege sukcesis dum la hispana kongreso en

Herrera del Duque, kun Georgo Handzlik en la rolo de direktoro kaj Saŝa Pilipoviĉ en la rolo de Antonio, ĉi verko far Jordi Garcerán estis tradukita el la hispana de Georgo



Hanzlik kun helpo de Rubi Birden. Ĝi estas bazita sur dialogo kun surprizoj de la komenco ĝis la fina sceno kaj la tikla temo banko-kredito.



La ekskusoj estis nombraj kaj tre interesaj, mi nur partoprenis du kaj mi mencias la plej interesan, kiu temas pri Vina vojo de Malgrandaj Karpatoj, kun vizito al pitoreskaj karpataj vinistaj urbetoj Modra kaj Pezinok kun la ĝis hodiaŭ konservitaj origi-

nalaj burĝaj vindomoj. Tie ni spektis kiel oni fabrikas mane belan kruĉon el argilo. Ni ekkonis la tradicion de vinkultivado kaj vinfarado en la vinmuzeo. Post vingustumado ni vizitis la kastelon perfekte renesanca, unu el la plej bone konservitaj monumentoj en Slovakio.

Kaj denove ĉi jare, dum la solena fermo de la kongreso, oni aljuĝis premion Antoni Grabowski al la hispana Bitoteko, kies respondeculo estas Ana Manero. Mi dankegis publike nome de HEF kaj Bitoteko.

Ángel Arquillos

LA 83 ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN FRASCATI



Inter la 20a kaj la 27a de aŭgusto okazis en la urbeto Frascati la 83a Itala Kongreso de Esperanto, kiu sukcesis kunveni iom pli ol 200 kongresanoj. Frascati situas 30 kilometrojn sudoriente de Romo.

En la posttagmezoj estis diversaj prelegoj sed la matenaj programoj estis ĉiam samaj. Oni rajtis

elekti inter tri kursoj de esperanto laŭ tri niveloj (baza, konversacia kaj perfektiga) aŭ inter du seminarioj, kiuj daŭris la tutan kongreson, nome *Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj*, de Kristin Tytgat, aŭ *Didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de esperanto*, de Katalin Kováts. Persone, mi preskaŭ ĉiutage ĉeestis la tre interesan seminarion de Tytgat, kiu profesie instruas la germanan, nederlandan kaj rusan al tradukistoj kaj interpretistoj en la Libera Universitato de Bruselo. Ŝi fakas ankaŭ pri interkulturaj rilatoj. Unu tagon mi partoprenis ankaŭ la same interesan seminarion de Kováts, kiu estas instruisto de esperanto, la itala kaj la rusa, kaj doktoro pri la propedeŭtika valoro de esperanto. Ŝi estas tre konata en Esperantujo, ĉar ŝi gvidis pli ol cent kursojn kaj trejn-seminariojn pri la instruado de nia lingvo.

La kongreso estis bela okazo por re-renkonti homojn, ekzemple dekon da hispanaj partoprenantoj. Mi aparte ĝuis la kunestadon kun mia malnova amiko Giulio Cappa, kiu ne nur estas senlaca aktivulo en la kampo de la esperanta beletra kaj tradukado, sed ankaŭ bonega homo. Mi estis ja fortuna, ĉar mi ekkonis ankaŭ aliajn interesajn kongresanojn, kiel Kristin Tytgat, Katalin Kováts, Céline Bernard (redaktoro de la franclingva pri-esperanta revuo *Espéranto-Info*), Korine Cheizoo (aktivulo en la literatura agado t.n. *Esperanto-sumoo*) kaj Elda Doerfler (kunredaktoro de *La Gazeto*).

Kompreneble, same kiel en multaj E-kongresoj, unu plena tago estis rezervita por diversaj ekskursoj, sed la specialaĵo de ĉi tiu renkontiĝo estis, ke praktike ĉiutage eblis elekti ekskurson jen duontagan (7 ebloj), jen plentagan (4 ebloj). Mi ne scias, ĉu tiu strukturo kutimas en la italaj E-kongresoj aŭ okazis nur ĉi-foje pro la proksimeco al Romo.

Nur du ekskursojn mi partoprenis, kaj intence ne iris al Vatikano —ĉar ĉi tiel mi havas belan kialon por reveni al la Eterna Urbo! Dum la tago en Romo, la tutan tempon mi havis la impreson, ke mi estas en urbo samtempe konata kaj nekonata. Konata, ĉar preskaŭ ĉion, kion mi vidis, mi jam cent-foje spektis sur fotoj; nekonata, ĉar jes kaj ja estis mia tute unua vizito!

Tiu stranga sento de (ne)konateco kuntrenis kuriozaĵojn: Foje la monumentoj ŝajnis al mi pli grandaj ol en mia imago, foje pli malgrandaj... Ekzemple, la Fontano de Trevi impresis kiel granda birdo en eta kaĝo, ĉar ĝi mem estas granda, sed la placo, kie ĝi situas, estas apenaŭ iomete pli vasta ol la fontano mem.

Plej multe mi ĝuis la Panteonon. La vizito estis kvazaŭ retrovojaĝo tra tempo-tunelo. Mi preskaŭ revidis min 16-jara ĉe la mezlernejaj lecionoj pri art-historio ĉe fraŭlino Manrique, kiu estis eble iom seka karaktere, tamen kompense ŝi instruis nin ekami la veran arton. Nu, pri la Panteono, tiu magia konstruaĵo planke cirkla kaj forme duonsfera, mi rekonis —fakte ĉion! Bonege mi memoris la tombon de Rafaelo kaj de la du unuaj reĝoj de Italio, sed ĉefe la truitan tegmenton, kiu enlasadas akvon okaze de pluvo, ĉar tiu trajto en publika, solena monumento ja surprizis nin ĉiujn en la klasĉambro de fraŭlino Manrique.

Sekvatage ni ĝuis la unikan sperton ekskursi al la agrablega natur-parko Circeo, kaj al la urboj Sabaudia, Terracina kaj Gaeta kun profesia gvidisto —kiu bonege parolas esperanton! Hontinde, mi ne memoras nun lian nomon (espereble li neniam legos ĉi liniojn), sed mi tuj diru, ke estis vere plezure aŭskulti lian klarigadon.



Mi ne forgesu paroli iom pri Frascati mem. Ĝi estas sufiĉe turisma urbeto kun interesaj preĝejoj kaj vilaoj. La urbocentro, kiu kaŝas tre belajn stratojn kaj placetojn, situas tute supre de altaĵo. La piedirado ja indas. Fine, la kongresejo (restadejo *Giovanni XXIII*) estis je 10-minuta pied-distanco de Frascati kaj montriĝis tute taŭga por

E-kongreso. Ĝia plejbono: La vasta teraso kie vespere eblis babilo kaj kuntrinki bierojn. Ĝia plejmavo: La dumtagaj promenadoj inter Frascati kaj la kongresejo estis preskaŭ tute sen-ombraj...

Antonio Valén

MIA IMPRESO PRI LA 83a ITALA KONGRESO EN LA URBO FRASCATI

Ion senpripense, ĉar mankis nur kelkaj tagoj por la limdato, mia edzino kaj mi aliĝis al la Itala Kongreso de Esperanto en la urbo Frascati, kie la vetero kaj la etoso similas al Malago. Mi tre ŝatas la italan lingvon kaj mi kapablas kompreni ĝin sufiĉe por, de tempo al tempo praktiki miajn konojn.

Sur monteto proksime de la urbo, staras la Centro Giovanni XXIII, kiu estas vera hotelo kun ampleksaj kaj komfortaj ĉambroj, grandaj salonoj, trinkejo, kortego, ĝardenoj ktp. Ni ĝuis neforgeseblan semajnon. Pli ol ducent homoj alvenintaj el la tuta mondo kunsidis kiel kutime inter esperantistoj, en bona harmonia etoso por komenci novan feston en Esperantio.



Kvazaŭ ni estus ĉe universala kongreso, ni povis elekti ĉiutagan ekskurson aŭ prelegon aŭ seminarion en la diversaj salonoj de la kongresejo, aŭ simple trinki bieron en la trinkejo kaj babili kun gesamideanoj, aŭ, kial ne? viziti la libro-servon, kie oni elmontras centojn da titolojn kaj en Esperanto kaj en la itala, sed ĉiuj pri la internacia lingvo. Mi ne havis tempon por enuiĝo, ĉar mi ĉeestis la seminarion de Katalin Kovats, kiu helpis min multe, ĉar la temo *Didaktikaj helpiloj por instruado kaj lernado de Esperanto* estis ege alloga kaj mi profitis ĝin, ĉar mi instruas bazan kurson kaj mi bezonis bonajn ideojn por perfektigi mian kurson. Mi ankaŭ havis la eblecon ĉeesti la seminarion gvidata de Kristin Tytgat *Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj*, sed mi devis elektis ĉar ambaŭ komenciĝis je la sama horo. Anna Lowestein, gvidis bazan kurson, kiu ankaŭ estis ege interesa, sed ne taŭgis por mi. Peter Weide gvidis altiran temon, kiun mi ne profitis pro la horaro, sed mi iamaniere malkovros ĝin, ĉar mi pretas traduki lian *Pequeña gramática de Esperanto*, kiun li publikigis en la germana, itala kaj angla lingvoj, sed ne en la hispana kaj li petis ke mi faru tiun tradukon. Mi volonte akceptis kaj mi esperas fari bonan laboron. Nina Pietuchowska gvidis *Perfektiva kurso pri Esperanto*, kun multnombra ĉeesto da gejunuloj. Humphrey Tonkin, krom inaŭguri la kongreson, prelegis pri *Esperanto kaj minoritataj lingvoj*. Kompreneble, en Italio ne povis manki la voĉo de Manŭel Rovere, kiu krom kanti belege, gvidis atelieron per amuza kaj instrua karaokeo laŭ profesia muziko de kantoj en Esperanto. *Ateliero pri origamio* sonas japane, tamen la ateliero estis gvidata de la ukrainino Larisa Osadchuk, kiu diras ke ŝi deziras kunigi Esperanton kaj origamion, ĉar ŝi pensas ke ambaŭ havas komunajn trajtojn kaj povas plifortigi unu la alian.



Pri prelegoj, ankaŭ mi povas opinii, ĉar Carlo Amerio prelegis pri *Esperanto, la lernejo kaj mi*. Bedaŭrinde mi ne ĉestis, sed mi certas ke la temo diras multon.

Mihai Trifoi ankaŭ prelegis pri *Lernado surbaze de projektoj*, interalie.

Sur la korto, ĉiutage okazis io nova, ĉefe dum la vespero: kantoj de Manŭel Rovere, Ventra dancado de juna

itala esperantistino, kaj la interkonatiga vespero, kie oni gustumis abundajn manĝojn kaj trinkis likvorojn el diversaj landoj en bona etoso.

En la urbo krom la malfermo, okazis spektakloj, piano-koncerto de Giorgio Di Nucci, lerta esperantisto kaj profesia pianisto, kiu regalis nin per tre bona muziko.

Ankaŭ menciindas la pupeta spektaklo por infanoj kaj plenkreskuloj en la bazaro de la urbo aranĝita por la okazo per kartonaj, sed komfortaj sidlokoj. Tie ankaŭ oni elmontris interesan ekspozicion pri Historio de Esperanto.

Por mi la ekskursoj estis vere interesaj, ĉar ni havis la eblecon ekkoni kuriozajn nekonatajn lokojn por turistoj en la ĉirkaŭaĵoj de Frascati, kvankam la plej grava estas tiu de la Aŭdienco de la Papo, kiun ni vidis pli malpli proksime, ĉar ni sidis en la granda pla-



co de la Vatikano kun centoj da homoj el la tuta mondo, sed la sperto estas neforgesebla, ĉar la Papo menciis nian grupon kaj deziris sukceson al nia kongreso.

Pli poste, grupe ni ĝuis la Vatikanajn Muzeojn gvidataj de esperantista ĉiĉerono Carlo Minnaja, kiu tre bone konas la historion de la muzeoj. Malfeliĉe, tiu tago estis speciala pro la aŭdienco de la Papo kaj la Muzeo estis plenplena da homoj, sed la pentraĵoj, ĉefe tiu de Mikelanĝelo, estas sur la plafono kaj ni miris ilin dumlonge. Tuj poste ni alvenis en la grandan kapelon, kie ni havis plian spacon kaj kun trankvilo ni fotis kaj travivis artajn momentojn.

Tiel estis mia sperto en la 83a Itala Kongreso de Esperanto.

Ángel Arquillos

FAMA HISPANA ROK-ENSEMBLO PRIOMAĜAS ES- PERANTON

Ili sin turnis al HEF. La knaboj de la rok-ensemblo *Cronómetrobudú* projektis nomian baldaŭ registrotan k-diskon –la sesan el ĉiuj KD-oj de ili produktitaj ĝis nun– *Esperanto*. Ili deziris prikanti la esperon. Kaj ili vidis en nia ideo la plej bonan manieron tion efektiviĝi. Ie tie ili do informiĝis pri nia lingvo kaj pri nia literaturo. Kaj trovis en la emblema E-poemo *Ho, mia kor'*, de Zamenhof, aperinta en ties *Unua Libro*, kiel ni ĉiuj scias, lirikaĵon plej taŭgan al ilia intenco, aperigindan en deklama formo en unu el la kantoj konsistigontaj la KD-on. Ili petis HEF-on pri deklamanto.

Kaj mi ricevis la proponon tion realigi. Mi devas konfesi, ke en la unua momento min ne tro entuziasmigis la ideo kunlabori kun dura-rok-uloj en registro de KD. Kiel sciante, muzike, miaj edukado kaj praktiko esence klasikas. Nuntempe mi tenoras ĉe la plektrorkestro Calle del Barquillo. Sed, kiam mi telefone parolis kun la kantisto de la ensemblo, Javier Castro, ondo da simpatio min invadis. Aliflanke, ĝuste tiumomente mi ne liberis. Mi estis tuj vojaĝonta Andaluzien. Sed por Javier tio prezentis nenian problemon: “En ordo, telefonu al mi ĉe via reveno, ni prokrastos la registron”, li diris akcepteme.

Kaj mi revenis kaj telefonis al li, kaj ni difinis rendezuon. Sekvatage Javier atendis min ĉe la elirejo de metrostacio. Alta, kalva, kun *piercing*-oj, juna, kvankam ne tro... li, tamen, en konverso, ŝajnis al mi la antitezo de tio, kion oni atendas de tiuspeca dura-rok-ulo. Tenero kaj modesto konsistigis liajn plej karakterizajn trajtojn. Survoje al la studio, li rakontis al mi la celon de la kanto *Luna* [Luno], komponita de li mem, por kiu la grupo pensis adekvata la enkondukon de voĉo en deklamo de la zamenhofa juveleto *Ho, mia kor'*. Ili volis ĉefe ĉi kanton kaj fakte la tutan k-diskon dediĉi al amikino, Lourdes (alnomata Lou), kiu venkadis en sia batalo kontraŭ kanceron. Nekredeble! Mia animo vibradis kvazaŭ forprenita el mia korpo.

Ni alvenis al la studio, unu el la madridaj plejsanktejoj de la rokmuzikaj registradoj. Oni tie sonigis al mi la kanton *Luna*. Kaj ĝi tre pozitive impresis min, malgraŭ ĉiaj malgraŭoj: intence akrajn sonojn el la drumo kaj el elektraĵaj gitaroj sekvis aliaj mildaj el violono kaj el la voĉo de Javier; aliflanke, la teksto montriĝis bela, jen dolĉa, jen amara, sed ĉiam tre zorgita, bonguste kaj lerte frapa:

Sankta gravito, vi nin haltigas.

Sankta leĝero, vi nin sorigas.

Entuziasmoplena, mi lokiĝis ĉe la registrobudo. Ricevinte la indikon “kiam vi volos”, mi komencis deklami la zamenhofajn versojn penante laŭiĝi al la ritmo –al la spiritkapta ritmo– de tiu kanto sorĉa kaj magia. Tiumomente mi estis de ĝi tute ravita.

La rezulto kontentigis la teknikiston tiom, ke, liaaserte, ne necesis pliaj ripetoj. Li kaj Javier miris, ke por la unua fojo okazas tiaĵo. Mi, tamen, petis duan registron por poluri la prononcon de kelkaj literoj.

Nu, tio signis la komencon de bona –kaj mi esperas, ke daŭre fruktodona– amikeco inter mi kaj Javier aŭ, se tiel diri, inter Esperantujo kaj *Cronómetrobudú*.

Nelonge poste, Javier sendis al mi mp3-kopion de la registrita *Luna*, kun la peto, ke mi ne diskonigu ĝin ĝis la apero de la KD. Mi tion faris, sed jam de tiam mi komencis kolekti el la *budú*-anoj mem informojn pri la ensemblo por distrumpeti la novaĵon kaj prezenti ilin al la “verda publiko” en la oportuna momento. Kaj tial, ke la KD aperis la 24an de la pasinta aŭgusto, jen mi faras nun ilian prezenton laŭe al la sobra, konciza kaj rekta maniero, kiel ili deziras esti prezentataj en nia medio:

“*Cronómetrobudú* estas Burgos’ a folkloro metalrok-bando kun pli ol 15-jara muzika sperto. La originala maniero, kiel iliaj membroj kiel tuto frontas la muzikon, igas ilin bazi la sonoron de la ensemblo sur la energio aplikata al la gitaroj, la klasika muziko, la ĵazo, la flamenko, la muziko de Balkanoj... Ili eĉ kuraĝas kanti kanton tute en la japana”.

Mi aldonu, ke, kadre de la metalroko, ili famas ne nur en Hispanio, sed, ankaŭ eksterlande, plej rimarkinde en Meksiko. En ilia oficiala retejo <http://www.cronometrobudu.com/> abundas informoj pri ili, pri iliaj diskoj, pri iliaj tre oftaj koncertoj... Kaj en jutubo spekteblas multaj el iliaj ludoj. Sed ĝuste en <https://youtu.be/DkVMkTFGSQI> aperas la tuta k-disko *Esperanto*. La sepa el la dekduo da kantoj tie aŭskulteblaj estas ĝuste *Luna*, en kies lasta parto aperas mia voĉo en deklamo de la zamenhofa *Ho, mia kor’*. Ĉi-reteje legeblas, krom diversaj informoj pri la KD, mia elhispanigo de la originala kantoteksto. Jen ĝi:

LUNO (LOUNO)

*Sidiĝu, rakontu al mi tion, lasu la sunon faldiĝi.
La stratoj nun dormadas, kaj neniuj estas ĉirkaŭ ni.
Sidiĝu, rakontu al mi tion.
Ni ambaŭ scias, ke ĉi abismo, kiu ŝvebas super vi,
ne justas, ne.*

*Jes, mi scias, ne tre prudentas rideti tenante viajn manojn,
temas pri pura timo.*

*Jes, mi scias, estas senpripense voli haltigi la venton per la manoj,
sed kolero min forprenas.*

Sankta gravito, vi nin haltigas.

Sankta leĝero, vi nin sorigas.

Sankta gravito, vi nin haltigas.

Sankta leĝero, vi iras kaj ne komprenas.

*Dume la luno sin kombas en sia dormoĉambro, koketa ridadas,
sin sentas plej sola.*

*Kaj sube, surtere, la tristaj mortaloj plendadas pri ĉio,
estas povraj kruduloj.*

Ĉu vi scias, Luno, ke ili celas nur trompi, sed ne kompreni, vin?

Ĉu vi scias, Luno, ke la plej kuraĝaj ja volas vin havi?

*Vin havi, mia Louno, kiu prilumas miajn rozojn,
tiel bela, tiel linda, tiel sola.*



Ĉi-reteje, en la sekcio de kritikoj, abundas laŭdaj opinioj pri la KD *Esperanto*. Pluraj el ili estas esperantaj notoj el Svena Dun, Esperanto Viva, Asociación Cántabra de Esperanto ks, t.e, fakte, de unu sola homo atentema, zorgema, nelacigebla kaj admirinda: Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu kutime multobligas sian voĉon i.a. favore al la bildo de ni projekciata ekstermovaden. Javier Castro sentis sin tre feliĉa el tio, ke “la esperantistoj reagis, cetere, tre pozitive!”. Nu, vi ĉiuj vokatas fari tute certa tiun entuziasman aserton plej simple: aldonante al ĉi sekcio vian gratulon aŭ viajn vortojn de ĝojo pro la fakto, ke oni donis al la k-disko la nomon *Esperanto* kaj elektis la poemon *Ho, mia kor’* kiel



esencan parton de la kanto *Luna*. Temas ja pri apenaŭa peno, kiu, tamen, povas esti tre utila por firmigi la deziron de la *budú*-anoj plue kunlabori kun ni.

Same, vi ĉiuj vokatas al aĉeto de la k-disko *Esperanto*. Ĝi aĉeteblas i.a. en la sekcio Tienda (Butiko), de la oficiala retejo de la ensemblo

[<http://www.cronometrobudu.com/>].

Cetere, endas instigi niajn libroservojn akiri ekzemplerojn de ĝi por faciligi ties distribuon en Esperantujo. Ni devas atesti pri nia ekzisto, pruvi al neesperantaj artistoj, ke estas inda kaj interesa artumi surbaze de niaj lingvo kaj kulturo, malgraŭ la modesteco de nia “verda mondeto”. Ni ne devas fordormi ĉi-specajn

okazojn. Ni esperantistoj pasigas duonon de nia vivo plendante, ke oficialaj instancoj, gravaj kulturhomoj kaj renomaj artistoj preteras nin, sed, kiam iu el ili turnas al ni sian atenton, ni ne malofte turnas al tiu la dorson. Ĉi-okaze ekzistas eblo de plia kunlaboro kun *Cronómetrobudú*. Javier Castro, la kantisto de la ensemblo, montris al mi simpatian al la ideo iam kanti esperantajn tekstojn. Ni potencigu kaj firmigu tiun ideon.

Nun, en la monato septembro, *Cronómetrobudú* sukcese turneas en Meksiko prezentante la k-diskon *Esperanto*. En Hispanio, niaj metalrokuloj faros tiuspecan prezenton en du okazoj kaj en du urboj. Unue, la venontan 1an de oktobro, en la rokejo Hangar, de la urbo Burgos; due, la venontan 5an de novembro, en la rokejo Moby Dick, de Madrido. Ili invitis min partopreni ambaŭ prezentojn por deklami *Ho, mia kor’* kadre de la ludo de la kanto *Luna*. Plej volonte mi akceptis. Estos por mi vera plezuro kaj vera honorotio fari. Kelkaj esperantistoj sciigis min pri sia intenco ĉeesti almenaŭ unu el la koncertoj. Bele, se multaj el vi imitos ilin! Bele, se du konsiderindaj “rondoj familiaj” kolektiĝos en Hangar kaj, respektive, en Moby Dick! Kiel ĝoje batos niaj koroj!

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

